# *Universitataj profesoroj de Usono petas nobelpremion pacan por kubaj kuracistoj*




Havano, nov 11 (RHK) Pli ol 200 usonaj universitataj profesoroj sendis leteron al la Komitato de Paco-Nobelpremio por subteni la nomumon de la kubaj kuracistoj al tiu premio en 2021, estis informite per gazetara komuniko.

Granda internacia kampanjo petas ke la premio estus donita venontjare al la kuracista ta?mento internacia “Henry Reeve” speciali?inta pri situacioj katastrofaj kaj gravaj epidemioj. Tiu ?i ta?mento estis kreita en 2005 de la kuba gvidanto Fidel Castro kaj la? la organiza komitato de Usono, la akademianoj skribintaj al la internacia komitato apartenas al diversaj fakoj, nome de sociologio kaj politikaj sciencoj ?is etnaj studoj kaj juro.

La subskribintoj reprezentas vastan spektron de universitatoj el lernejoj de la Ligo Ivy kiel Harvard, Yale, Brown kaj Columbia, ?is ?tataj institucioj kiel la universitatoj de Massachusetts, Maryland kaj Kalifornio.

La noto sciigas ke la kuracista brigado kuba sendis pli ol 50 brigadojn al landoj de la tuta mondo por kuraci personojn kun la Covid-19 kaj helpi preventi konta?ojn meze de la pandemio.

“?is oktobro de tiu ?i jaro, pli ol 3700 san-profesiuloj kubaj partoprenis en tiu ?i klopodo”.

Félix Kury, emerita profesoro de la ?tata universitato de San Francisco kaj fondinto de la kliniko Martín-Baró, esprimis ke ne ekzistas pli bona momento ol tiu ?i por elstarigi la senproficelan laboron de la kubaj profesiuloj, kiuj batalas kontra? la kronviruso dum riskas sin propran vivon, kaj asertis ke pro ties altruista kaj solidara laboro ili meritas la Pac-Nobelpremion.

Adrienne Pine, direktorino de la programo Malegaleco kaj Sanprizorgo de la Universitato Amerika, esprimis ke ili agnoskas la eksterordinaran ekzemplon de internacia solidaremo donita de la kuba specialistoj, kiuj savas vivon tra la mondo dum en Usono la indikiloj de Covid atingas rekordajn nivelojn.

Ili elstarigas ke, krom batali kontra? la Covid-19, la kubaj brigadoj de la ta?mento Henry Reeve, anka? grave rolis post naturaj katastrofoj okazintaj en landoj kiel Gvatemalo, Bolivio, Meksiko, Salvadoro, Pakistano, Indonezio, ?ilio, Ekvadoro kaj Haitio.

Anka? memorigis ke inter la plej gravaj misioj de la brigado estis la batalo kontra? ebolo en okcidenta Afriko kaj kontra? ?olero en Haitio.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/239406-universitataj-profesoroj-de-usono-petas-nobelpremion-pacan-por-kubaj-kuracistoj

**Radio Habana Cuba**